

SVENSKA  
ESPERANTO-  
TIDNINGEN

# La Espero

2007:5

## Esperanto malaperas ĉe RAI kaj aperas ĉe ipernity

### Itala radio eksilentis en Esperanto

La 1-an de oktobro la itala radio RAI ĉesigis siajn mallong-ondajn elsendojn al eksterlando. Programoj en kelkaj lingvoj estos plu produktataj por elsendo per satelito kaj interreto. Ĉesis interalie la esperantlingvaj elsendoj, kiuj komenciĝis en 1935, okaze de la Universala Kongreso de Esperanto en Romo.

Post dua mondmilito la esperantlingvaj elsendoj de RAI rekomenciĝis en 1950. Ekde la jaro 1971 kiel tradukisto kaj parolisto en la esperantlingva programo laboris Antonio De Salvo.

- Hodiaŭ mi registris la morgaŭan, lastan programon en Esperanto, kies lastaj vortoj estas "Ĝis ne-reaŭdo; nia programo en Esperanto estas finita, rakontas Antonio De Salvo en mesaĝo dissendita en la diskutforumo SCE.

La elsendoj lastatempe estis disaŭdigataj ĉiun sabatan vesperon, kaj daŭris dudek minutojn. La esperantlingvaj elsendoj estis disvastigitaj ne nur per mallongaj ondoj, sed ankaŭ per la eŭropa satelito Hotbird, uzante malnovan, analogan satelitan teknologion.

Itala Esperanto-Federacio sekvis la tutan procedon kaj intervenis interkonsente kun la prizorganto de la programo, faris gazetaran komunikon, kontaktis la decidontojn kaj aliajn politikistojn. La espero estis kaj ankoraŭ estas havi la dissendon en la reto, li komentis en la reta diskutejo uea-membroj.

Laŭ [www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org)



### ipernity en esperanto ;-)

ipernity, la unua kunhaviga retejo, kiu ebligas ĉiujn ciferecajn plurmediajn dosierojn, estas ekde nun vizitebla en Esperanto.

Ipernity, kiu estis lanĉita antaŭ 5 monatoj en la lingvoj angla kaj franca, jam ekde la komenco estis forte ŝatata de pluraj Esperanto-parolantoj, el kiuj kelkaj spontanee volontuliĝis por traduki ipernity en la lingvon de D-ro Zamenhof.

"La forta ligo, kiu kunigas niajn membrojn kun ipernity, ebligis al ni alfronti la problemon de plurlingvigo en komuna kaj volontula maniero, kie la membroj mem kunlaboris en la tradukado, uzante eksterretan tradukilon. Ni tiel akiris tre rapide tradukojn de la retejo, kiuj korespondas perfekte al la bezonoj de la uzantoj", deklaras Christian Conti, kunfondinto de la servo.

Danke al tiu ĉi metodo ipernity estas ekde nun havebla en 6 lingvoj, in-

ter kiuj la germana, la hispana kaj la itala! Pro ĝia rapide kreskanta sukceso, la asocio jam komencis novajn tradukojn por povi malfermiĝi al pli granda nombro kaj al pli da diverseco, kaj por la feliĉo de siaj membroj. ;-)

<http://www.ipernity.com>

### Aperoj kaj malaperoj

Jen du novaĵoj. Unu estas malĝojiga por ni esperantistoj, la alia estas ĝojiga.

Ni tamen devas alkutimiĝi al tio ke Esperanto vivas laŭ la samaj kondiĉoj kiel aliaj mezgrandaj lingvoj en la mondo. Jes, malaperas ankaŭ aliaj mallongondaj radiaj programoj. Antaŭ dudek jaroj Pollando, Estonio, Latvio, Italio kaj aliaj landoj sendis mallongondajn programojn ankaŭ en la sveda lingvo, sed ne plu. Oni povas diri ke mallongondaj programoj estas malaperanta fenomeno tute ĝenerale, ne nur kiam temas pri Esperanto.

Ni tamen havas alian fenomenon. Interreto kreskas ankoraŭ. Kiam Franko Luin donis al mi ĉion necesan por redakti La Esperon antaŭ kelkaj jaroj, li donis al mi ankaŭ dosieron kun la e-heliko. Ne a-heliko (@), sed tiu simbolo, kiu aperas ĉi-supre. Ĝia mesaĝo estas ke Esperanto similas al interreto. Ambaŭ konstruas pontojn inter popoloj. Do, uzu ambaŭ!

**Leif Nordenstorm**

## LA ESPERO

### Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

Novembro 2007 • 95-a jarkolekto

Fondita en 1913

**Redaktion:** Leif Nordenstorm

#### Frågor om prenumeration o. dyl.:

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,  
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

**E-post:** [esperanto@glocalnet.net](mailto:esperanto@glocalnet.net)

**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm

**Utformning:** Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

**Tryck:** Al-fab-eto, Skövde

**Prenumeration 2007:** 200 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

## ESPERANTOFÖRBUNDET

**Adress:** Esperanto-Centro,  
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,  
tel. 08-34 08 00

**E-post:** [sef@esperanto.se](mailto:sef@esperanto.se)

**Nätsida:** [www.esperanto.se](http://www.esperanto.se)

**Öppettider:** Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

**Postgiro:** 20 12-3, Esperantoförbundet

#### Medlemsavgift 2008:

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*).

Tilläggssexemplar kostar 100 kr/år.

## ESPERANTOFÖRLAGET

**Adress:** Masthuggsliden 1, 413 18 GÖTEBORG  
**Postgiro:** 578-5 **Nätsida:** [www.algonet.se/~eldona/](http://www.algonet.se/~eldona/)  
**E-post:** [eldona@telia.com](mailto:eldona@telia.com) **Telefon:** 031 - 12 05 94.

## ESPERANTOGÅRDEN

**Adress:** Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,  
**Nätsida:** [www.e-g.se](http://www.e-g.se) **E-post:** [egarden@esperanto.se](mailto:egarden@esperanto.se)  
**Telefon:** 0590-309 09

### Manus till La Espero

sänds till Leif Nordenstorm, Järnvägsgränd 11  
961 76 Boden, tel. 0921-123 54

**e-post:** [esperanto@glocalnet.net](mailto:esperanto@glocalnet.net)

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 1	15 januari	15 februari
Nr 2	28 februari	30 mars
Nr 3	30 april	31 maj
Nr 4	15 augusti	15 september
Nr 5	30 september	31 oktober
Nr 6	31 oktober	30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

## NI PREZENTAS

# Ingrid Näsholm



kiu nun estas plenkreska kaj loĝas ekster Sundsvall.

*De kiam vi interesiĝas pri Esperanto?*  
De kiam mi estis 12-jara ĉar mia patrino Anna scipovis la lingvon. 14-jara post loka kurso por Torsten Farm mi kaj mia amikino Kerstin partoprenis nian unuan kongreson en Kopenhago. Vere impona travivaĵo! Depost tiam la geamikoj kaj kontaktoj pere de Esperanto grave influis mian opinion pri la homaro kaj pri internaciaj kontaktoj, ke fakte Svedio ne estas la tuta mondo kaj multon eblas lerni de aliaj alilande.

*Ĉu vi havis aŭ havas iujn taskojn en la Esperanto-movado?*

Mia unua tasko estis kiel estraranino de SEJU kaj poste kiel la plej unua ina estrarano de TEJO.

Nuntempe mi dum pluraj jaroj estis prezidantino de la loka klubo.

Mi de la komenco estis membro de Rondo Kato la unuiĝo por esperanto-parolantaj katŝatantoj kaj nun estas ĝia sekretariino. Dum 5 jaroj mi ankaŭ redaktis la gazeton por ili. En Tamperea kongreso 1995 mi invitis al la unua kunveno de Rondo Kato. Ple-nalono kaj post tiu dum 12 jaroj ĉiam estis kunveno de Rondo Kato dum UK. Mi skribas artikolojn por la gazeto, produktas tekstofotojn kun katoj kaj iu interesa esperanta teksto kaj tenas kontakton kun katŝatantoj rete.

*Kiu estas via preferata libro en Esperanto?*

"Ili vivis sur la tero". Ok jaroj da migrado ĉirkau nia planedo, de Maryvonne kaj Bruno Robineau. Mi havis eblecon ankaŭ renkonti ilin dum kongreso en Montpelliero kaj aŭdi ilin mem rakonti pri iliaj travivaĵoj. Vera provo ekkoni la vivon de aliaj homoj en tute aliaj kulturoj. Mi rekomendas la libron!

*Ĉu vi havas familion?*

Se iu interesiĝas pri Rondo Kato kontaktu min per [rondokato@hotmail.com](mailto:rondokato@hotmail.com) por pli da informoj.

Skribe intervjuis: Leif Nordenstorm

*Kie vi naskiĝis?*

Mi naskiĝis en Sundsvall, Svedio kaj ankoraŭ tie vivas.

*Kie vi loĝas?*

En Sundsvall en sama domo ĉiam.

*Pri kio vi laboras?*

Nun mi estas pensiulino. Mi laboris 39 jarojn kiel flegistino, pri interna medicino kaj laste pri rehabilitado por malsanaj maljunuloj.

*Kiujn interesojn vi havas krom Esperanto?*

Mi interesiĝis pri moroj kaj kutimoj en aliaj landoj. Uzo de esperanto multe helpis dum tre multaj vojaĝoj privataj kaj al kongresoj. Alia intereso estas bestoj kaj naturo. Mi komencis rajdi ĉevalon dekjara, poste posedis tri ĉevalojn, unu post la alia. Nun mi regule pruntas la ĉevalon de amikino kaj rajdas en niaj arbaroj. Kelkaj konatoj atendas ke mi ĉesu rajdi ĉar mi nun estas 65-jara. Malgraŭ ke mi elfalis lastsemajne dum galopado kiam neatendita hundo atakis la ĉevalon, mi planas daŭrigi tiel longe kiel eble. Antaŭ tridek jaroj mi ekinteresiĝis pri katoj kaj tiu intereso nur kreskis. Nuntempe mi breadas siberiajn raskatojn.

*Ĉu vi havas familion?*

Jes mia edzo Åke kiun mi ekkonis en najbara E-o klubo, kaj nia filino Lena

# Du someraj aranĝoj en Finnlando

*Okazis en Finnlando someron 2007 du gravaj esperantaj aranĝoj. Por la oka fojo Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF) organizis kurson en Popola Instituto de Valamo. Ĝi okazis 23-27 de julio. Tuj poste EAF invitis al Festivalo Arta Lumo 27 de julio-1 de aŭgusto en Kuopio. Mi partoprenis ambaŭ aranĝojn.*

Kial Valamo? Ĝi estas grekortodoksa monaĥejo al kiu apartenas la Popola Instituto, situanta en arbaro ĉe la lago Juojärvi en la orienta lagregiono de la suda parto de la lando. Do ĝi situas bele. Estas tie tranoktejoj kaj

Finnlando. Ili ne tuj trovis taŭgan lokon, sed fine ili decidis resti en la loko kie ili nun estas.

Hodiaŭ estas dekdu monaĥoj en Valamo. Por vivteni sin certe multe gravas turistoj kaj kursanoj. Valamo ne ricevas monon nek de la ŝtato nek de ekleziaj organoj. Dum la somero ĉirkaŭ kvindek dungitoj laboras tie kaj ankaŭ ĉiun semajnon ĉirkaŭ kvindek volontuloj.

Oni povas atingi Valamon diversmaniere. Mi iris per ekspresbuso dum ses horoj de Helsinki direkte al Valamo. Aliaj kursanoj, kiuj vojaĝis per trajno, devis eliri la trajnon dudek kilometroj de Valamo kaj preni taksion. Aliaj havis siajn proprajn aŭtojn.

La kurson partoprenis dekdu esperantistoj, de kiuj naŭ venis el Finnlando, du el Svedio (mi kaj Soile Lingman) kaj unu el Nederlando. Instruis nin Atilio Rojas de la Internacia Esperanto-Instituto en Den Haag, Nederlando kaj Tiina Oittinen, EAF-sekretario. Ili ŝanĝis inter la du grupoj komencantoj kaj daŭrigantoj. Estis instruado dum tri horoj antaŭ lunĉopaŭzo kaj dum du horoj posttagmeze. En la daŭriga grupo ni parolis, legis artikolojn pri Finnlando ktp kaj ekzercis gramatikon. Vespere Tiina amuzigis nin per muziko ĉar ŝi ludas violonon.

Estis sufiĉe da libertempo. Ni kune migris en la arbaro. Ni vizitis tipan finnan saŭnon. Ni piediris al la arbara tombejo de Nova Valamo. Sub lignaj krucoj kuŝas monaĥoj kaj ankaŭ monaĥinoj de la monaĥinejo Lintula kelkaj kilometroj de Valamo.

Venis la lasta tago de la kurso. Estis la tago por adiaŭi sed ankaŭ la tago de la ŝipvojaĝo de Valamo al Arta Lumo en Kuopio. La vojaĝo daŭris kvar horojn tra bela pejzaĝo. Kaj la suno brilis. En la haveno de Kuopio aliaj esperantistoj bonvenigis nin kaj ni kune piediris al la tranoktejoj. Poste okazis interkona vespero.

EAF festis cent jarojn 2007. Unu grava okazaĵo estis la Festivalo Arta Lumo. EAF reklamis la festivalon per invito "por kune ĝui niajn artajn kreaĵojn, la varian Esperantokulturon kun la plej bonaj muzikistoj, verkistoj kaj aliaj artistoj en ĉarma ĉelaga urbo." Partoprenis en la festivalo ĉirkaŭ kvardek esperantistoj plus la artistoj. Al la koncertoj ankaŭ loĝantoj de la urbo estis bonvenaj. La ejo de la festivalo estis la moderna muzikcen-

tro en Kuopio kaj ĝi estis tre taŭga.

Inter la finnoj Anja Karkiainen gvidis literaturajn programojn, koncertis la esperantorokbando Dolchamar, prezentis Markku Sarastamo sian artan ekspozicion. Prelegis pri literaturo la fama redaktoro de la Ondo Aleksander Korĵenkov el Kaliningrad. El la sama urbu venis la juna kantistino Natalia Strijnova. Franca paro Francoise Rochette kaj Patrick Delaby bone ludis gitaron kaj akordionon, kantis kaj dancis. Ilia arta nomo estas Duobla Unu. Hispano kun la la arta nomo Solo prezentis tre ŝatatan jazkoncerton. Pri koncerto de orevena improvizado en nova preĝejo en la urbo ni ankaŭ estis tre kontentaj. Ludis Esa Toivola.

Eble la pinto de la festivalo estis kantela koncerto kun danco. Mi citas el la programo: "Timo Väänänen, la evoluiginto de la elektra kantelo, malkaŝas novajn dimensiojn de la kantelo kun la dancistino Päivi Järvinen. La koncerto bildigas la kantelon de la nuntempo en komunikado kun la tradicio, kiu levis ĝin al la statuso de nacia instrumento".

London estis duontaga saŭno-ekskurso al la kamparo. Ni estis en fumsaŭno kaj poste naĝis en la rivero. Ni manĝis rostigitajn kolbasojn, trinkis bieron kaj kafon kun kiu estis bongusta torto. Amuzis nin la Duobla Unu. La vespero estis hela, varma kaj bela.

Mi volas danki ciujn organizantojn pro bonaj ferioj en Valamo kaj en Kuopio la someron 2007.

**Kerstin Kristoferson**



La afiŝo de Arta Lumo.

bona restoracio. Mi volas ankaŭ mencii la kvietan atmosferon en Valamo, kiu estis mense agrabla. La multaj turistoj ne faris bruon.

Valamo monaĥejo en Finnlando nomiĝas Nova Valamo. La origina monaĥejo situas en Rusio. Tuj post la dua mondmilito multaj monaĥoj rifuĝis okcidenten. Ili povis kunporti multajn monaĥejajn valoraĵojn al

Esperanto-Asocio de Finnlando, Esperantoförbundet i Finland, grundat 1907, har 8 lokala medlemsföreningar. Medlemmar är även Finlands Esperantoungdomsförbund FEJO, Lärarnas esperantoförening i Finland ELFI och de blindas esperantoförening Steleto. Kansliet i Hagnäs, Helsingfors, upprätthålls med frivilliga krafter. Medlemsantalet är ca 400.



# Lennart Svensson brinner för språket

Firar esperanto på Europeiska språkdagen

Onsdagen den 26 september är det Europeiska språkdagen.

På Esperantogården i Lesjöfors firar det enda språk man väljer att lira - esperanto, förstås, med föredrag, minispråkkurs och utställning.

- Esperanto borde in i skolan som första främmande språk under ett eller ett och ett halvt år, tycker Lennart Svensson, esperantofantast. "Por ĉiokaj amikojn luter la homoj."

Om någon säger: det till dig i morgon har du fått dig en dos esperanto - och en beskrivning av språket som på svenska skulle lyda "språket för fred och vänskap mellan människorna".

Själva idén med esperanto är naturligen att människor i olika länder

lättare ska få kontakt, genom att alla kan få ett gemensamt språk som kompletent till de 6 000 olika språk som surrar runt om i världen nu.

Kan vi inte språkligt förstå varandra - infinner sig rädslan som försvarar vänskapen framhåller Lennart Svensson på Esperantogården.

## DIREKTKONTAKT

Han brinner verkligen för esperanto och tycker att detta världsspråk borde in i skolorna. Inte minst för att det blir lättare att lära sig andra språk om man först lärt sig esperanto.

- Jag har läst om en undersökning från Osaka som säger att en japan behöver sju-åtta år på sig för att lära sig engelska, men esperanto lär sig en japan på två års studier, och sen kan han lära sig engelska

på bara fyra -fem år.

Lennart Svensson vill också att asylsökande som kommer till Sverige ska få lära sig både svenska och esperanto av samma skäl - plus att de kan ha nytta av extraspråket om de inte skulle få stanna i Sverige.

För egen del tycker han att den stora vitsen med esperanto är chansen att få direkt kontakt med människor runt om i världen.

- Jag kan till exempel få information direkt av en iraker som kan esperanto. Annars skulle en engelsman översätta och sen skulle en svensk översätta från engelska, och i översättningarna följer alltid översättarens värderingar med litegrann. För mat läsa eller höra det direkt istället får man ju en helt annan bild. Under språkdagen som

firas på Esperantogården under eftermiddagen och kvällen kommer Lennart Svensson att berätta mera om språket. På kvällen håller han dels en introduktionskurs, dels ett föredrag om hur esperanto utvecklats, men också motarbetats genom åren.

Lennart Svensson lovar inte att han kommer lära besökarna esperanto på en kväll, men däremot att det är lättare att lära sig esperanto än många andra språk att pussa.

- Det fördras ju övning och övning, men om man lär sig de 10-15 mest gängbara öfterstavelserna och 60 ordstämman, så kan du säga ut! En lingvist en som kan språk, behöver en till en och en halv timme på sig för att få en överblick i hela grammatiken, och sen är det bara för honom att plugga glossor.



Lennart Svensson på Esperantogården tycker att esperanto borde ingå i skolorundervisningen.

FOTO: TT ARBY

## I tre tidningar

Filipstads tidning passade på att skriva om esperanto 25 september eftersom den europeiska språkdagen skulle inträffa dagen därpå. "Lennart Svensson brinner för språket". Det visste vi redan, vi som vet att Lennart är föreståndare för EsperantoGården i Lesjöfors. Artikeln visar att det kan löna sig att ta kontakt med journalister. Esperanto är tillräckligt intressant för att de skall vilja skriva då och då.

Göteborgs-posten beskrev 15 september under rubriken "Esperantoplatsen ska göras grönare" hur torget med samma namn skall få en park med träd, gröniska, gräsmatta och sittplatser. Visst passar det bra att Esperantoplatsen blir grönare eftersom färgen grönt är en symbol just för esperanto.

I Dagens Nyheter 21 juli skrev Jackie Jakubowski en helsida under rubriken "Ett språk, en Gud, en värld". Det handlade om Lidia Zamenhof, dotter till esperantos skapare Ludvig Zamenhof. Artikeln är delvis en recension av boken "Lidia, Daughter of Esperanto" av George Ronald.

Boken och recensenten slår fast att Lidia påverkades av sin far. "Hos familjen Zamenhof rådde esperanto - ett obrutet hopp om människan, verkligheten till trots." Lidia påverkades såväl av faderns engagemang för esperanto som av hans tankar om en broreligion - homaranismo - som skulle kunna vara ett slags "allas andra religion", en idé som aldrig togs upp av esperantorörelsen. Lidia kom så småningom att i stället bli anhängare till Bahai - en religion med persiskt ursprung.

Utan tvekan är Lidia Zamenhof en intressant och fascinerande människa.

## Ny kassör för SEF

Svenska Esperantoförbundet har bytt kassör. Numera är det Anita Dagmarsdotter som ser till att utbetalningar och inbetalningar fungerar och att allt bokförs på korrekt sätt.

## Bliv medlem i UEA 2008

UEA är den största organisationen i världen för esperantister.

Den behöver ditt stöd för att allt bättre uppfylla sina viktiga uppgifter att

- \* sprida esperanto
- \* verka för en lösning på språkproblemet i internationella sammanhang
- \* underlätta all sorts kommunikation mellan människor oavsett ras, religion eller politisk åsikt
- \* därmed öka förståelsen mellan folk och länder

UEA ger ut flera esperantotidningar bl.a. Revuo Esperanto, har en omfattande bokförsäljning och anordnar varje år en stor internationell världskongress för att nämna några verksamhetsområden.

För din egen del betyder det, att du får UEA:s årsbok med namn och adresser på delegater i hundratalet länder, och, om du är MA-medlem, får du tidningen Esperanto, som ger dig värdefull information om vad, som händer i esperantovärlden. Dessutom ger medlemskapet dig rätt till betydligt lägre kongressavgift.

Du betalar avgiften genom att sätta in pengarna på postgiro 14 74 29-5, SEF specialkonto. Ange på talongen vad pengarna avser.

Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, 242 35 Hörby, tel. 0415-50152

Avgifterna för år 2008 är följande:

MA Direktmedlem med årsbok och tidningen Esperanto. Om man är under 30 år blir man automatiskt medlem även i TEJO och får tidningen Kontakto.	540 kr
MJ Direktmedlem med årsbok. I övrigt se ovan!	215 kr
MG Direktmedlem med "Gvidlibro". Ger inte nersatt kongressavgift.	85 kr
SZ Avgift för "Societo Zamenhof", särskild stödorganisation. Ger inte medlemskap i UEA.	1 080 kr
PT "Patrono de TEJO", får tidningen Kontakto	645 kr
DM Dumviva membro" betalar för hela livet. Får årsboken och tidningen Esperanto	13 500 kr
DMJ "Dumviva membro kun jarlibro" betalar för hela livet. Får årsboken	5 375 kr
Dpat "Dumviva Patrono", betalar för hela livet. Får tidningen Esperanto och årsboken och blir därtill ständig medlem i "Societo Zamenhof".	135 000 kr
DPT "Dumviva Patrono de TEJO" betalar för hela livet och får tidningen Kontakto.	16 125 kr

## Lilli Vikström



## Prenumerera

SEF erbjuder sina medlemmar att prenumerera på esperantotidningar för 2008. Du beställer tidningarna genom att sätta in pengar på postgiro 14 74 29 -5, SEF, specialkonto, samt att på talongen ange vilka tidningar, som avses.

Vill du fråga något ytterligare kan du göra det hos:

Lisbet Andreasson  
Kajsa Kavats gata 8  
242 35 Hörby  
Tel 0415-50152

Tidning	nr/år	pris kr
Esperanta Finnlando	6	170*
Esperanto	11	345
Esperanto en Danio	5-6	125 *
Femina	4	205
Heroldo	17	350
ICEM	4	170 *
Juna Amiko(rabatt från 3 ex)	3	130 (105)
Komencanto	6	170
Kontakto	6	205
La Jaro	1	49
La Kancerkliniko	5	210
La Ondo	11	300
LaOndo	rete	112
Literatura Foiro	6	310
Litova Stelo	6	130
Monato	11	460
Monato	rete	275
Norvega Esperantisto	6	105
Oomoto, nur rete		
<a href="http://www.oomoto.jp/esrevuo/Oo453.pdf">www.oomoto.jp/esrevuo/Oo453.pdf</a> , senpage		
Ret-Ventoj <a href="http://www.esperanto.hu/eventoj/">www.esperanto.hu/eventoj/</a> , senpage		
Scienca Revuo	4	190
Språket Esperanto (för 5 nummer)		100
TEJO-tutmonde	4	110

Tidningar markerade med \* har inte lämnat prisuppgift för 2008

Lilli Vikström naskiĝis en 1918 Hässlö. Ŝi iĝis la 16-an de julio ege malsana pro koratako kaj akvo en la pulmoj, kaj venis al Sabbatsberg malsanulejo. Kiam ŝi iĝis pli sana, ŝi venis al Solbacken malsanula hejmo, kie ŝi mortis la 1-an de septembro matene. Lilli lernis Esperanton de Anna Alamo kaj dum la unua KELI-kongreso in Tostarp 1948 mi ekkonis ŝin. En la preĝejo de Abrahamsberg ni havis kunvenojn sabatvespere kaj tie ŝi helpis pri la servado. En mia hejmo in Solberga ni havis KELI-kunvenojn. Mia edzino Mijntje kaj Lilli kune kantis kaj ŝi ofte rakontis pri la kongresoj, kiujn ni kune partoprenis. Lilli kaj Maria kune veturis al Pardubice, kie ili ekkonis Jarmila Ryznarova. Lilli estis dumviva membro de KELI. Ŝi estas funebra de KELI kaj la Sveda Esperanto-Federacio kaj la baptistaj eklezio. La enteriga diservo okazis en Kungsholmen baptista preĝejo.

Arne Lundkvist



## Oranĝa renkontiĝo

De la 21-a ĝis la 23-a de septembro okazis la Oranĝa Renkontiĝo en Hernusando (Härnösand), Svedio. La renkontiĝon organizis Hernusanda Esperantista Klubo kaj SEJU. Partoprenis 14 homoj el kvin landoj.

La renkontiĝon ornamis la aŭtunaj koloroj de la apuda arbaro. Arbara ekskurso estis unu el la programoj; aliaj estis koncerto de La Perdita Generacio, piedpilkado, mondĉampionado de bakio (novinventita ludo simila al ŝako), leciono pri la planlingvo toki pona, lingva gimnastiko, kaj diskuto pri la esperanta ideo. Multaj venis frue dum antaŭrenkontiĝo kaj restis poste dum postrenkontiĝo.

Okazis dum la semajnfino ankaŭ kroma jarkunveno de SEJU. Elektiĝis estraro: Magnus Henoĥ (prezidanto), Carl Mäsak kaj Robin Rönnlund.

## IJK 2008 en Hungario

Venontjara IJK okazos en Hungario, en la urbo Szombathely, inter la 26a de julio kaj la 2a de aŭgusto 2008, decidis TEJO-estraro. Hungara organiza teamo, kun helpo de internaciaj geamikoj, prilaboras ret-paĝaron kun pli da informoj - kotizoj, ejoj, programo, ekskursoj. Rezervu tempon por IJK-umi, kaj revenu ĉi tien por sekvu novajojn!

Szombathely /:sombathej:/ situas ĉe la okcidenta landlimo de Hungario. Ĝi estas regiona centro kun ĉ. 80000 enloĝantoj, kun riĉa kultura vivo. La urbo estis fondita antaŭ 2000 jaroj, fare de pensionigitaj romiaj soldatoj - la kulto de la romiaj tempoj ankaŭ nuntempe estas ege grava: rigardu ekz. ĉe [www.savariakarneval.hu](http://www.savariakarneval.hu)

Szombathely estas facile atingebla de Vieno, Graz (Aŭstrio) kaj Budapeŝto (per rektaj trajnoj).

Ĉar Szombathely estas landlima urbo, ĝi estas tre malfermita al aliaj kulturoj: ekzistas ĉi tie 3 minoritataj urboregistroj (kroata, cigana, germana), kaj ofte oni okazigas minoritatajn festivalojn.

**Svenska Esperantokongressen äger rum i Göteborg 2-4 maj 2008.**

**Sveda Esperano-Kongreso okazos en Gotenburgo 2-4 Majo 2008.**

Mer information i nästa nummer av La Espero och på hemsidan.

Pli da informoj en la sekvonta numero de La Espero kaj en la retpaĝo.

<http://esperanto-gbg.org/kongress.html>

ANONCETOJ

DEZIRAS  
KORESPONDI

62-jara pola vidvino, emerita konstruteknikisto: Janina Jarecka, Poznan, Rynek Lazarski 9/15, Pollando.

Ŝia 36-jara filo Kristofero Jarecki, sama adreso.

Ŝia 32-jara bofilino Marzena Jarecka, sama adreso.

## Novaj tradukoj de La Infana Raso

En la retejo de Esperantista Verkista Asocio nun aperas novaj nacilingvaj tradukoj de La Infana Raso de William Auld.

Por omaĝi al la elstara poeto William Auld, ekde la 11-a de septembro Esperantlingva Verkista Asocio disponigas, en pdf-dosieroj, tri nacilingvaj tradukojn de La Infana Raso kiujn oni rajtas libere elŝuti kaj diskonigi: la skotan kaj la anglan versiojn disponigis Girvan McKay, dum la francan Jean-Pierre Danvy. Baldaŭ estos preta ankaŭ hungarlingva versio de István Ertl. Aliajn tradukojn legu en la sekcio pri William Auld de la retejo.

[www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org)

## 334 gestudentoj eklernas

En la dua semestro de koreaj universitatoj, 334 gestudentoj aliĝis al la kursoj de Esperanto, kiuj komenciĝis de aprilo en la universitatoj Korea fremdlingva Dankook kaj Wonkwang. La aliĝintaj studentoj lernos Esperanton dum 16 semajnoj po du horoj semajne kaj ili gajnos du notojn oficiale. La studentoj de tempo al tempo provos paroli Esperante kun nekoreaj esperantistoj en Skajpo, reta komunikilo dum lecionoj. Via bonvola reago donos grandan motivon al la studentoj. Jen estas Skajpo-adreso de la docento LEE Jung-kee, kiu instruas en tri universitatoj:

Skajpo-adreso : leejungkee Retadreso : [esperanto@saluton.net](mailto:esperanto@saluton.net)  
LEE Jung-kee

## Interlingvistika sesio

La aŭtuna sesio de la Interlingvistikaj Studoj atendis la partoprenantojn kun pli riĉa programo ol kutime, ĉar en la tria jaro de la studoj okazas specialiĝo, ĉi foje pri komunikado, lingvistiko kaj lingvopedagogio.

István Ertl prelegis por ĉiuj pri la nuntempa e-literaturo kaj analizis kelkajn verkojn.

La kurso de la bone konata psikologo kaj verkisto Claude Piron pri psikologiaj aspektoj de komunikado ka-

tenis la atenton de la aŭskultantoj. Ilona Koutny, gvidanto de la Studoj, prezentis lingvistikajn aspektojn de komunikado, i.a. esploris la e-lingvan bildon de la mondo.

Enkadre de la lingvopedagogia specialiĝo, destinita al instruantoj kaj instruontoj de esperanto, Katalin Kováts, prizorganto de la elstara instruista retejo Edukado.net enkondukis la partoprenantojn al la bazaj faktoroj de lingvoinstruado kaj Maria Majerczak, metodikistino de la Jagielona Universitato en Krakovo, traktis metodikon.

Al la programo kontribuis ankaŭ Zsófia Koródy, vicprezidanto de ILEI. La nuna sesio estis specifa, ĉar la lingvopedagogia specialiĝo realiĝis en la kunlaboro de UAM kun ILEI, kaj pro tio povis aliĝi ankaŭ kromaj partoprenantoj (7 personoj el 4 landoj). La kunordigita instruista trejnado daŭros unu jaron (kun reta konsultiĝo inter la sesioj). Tiuj ĉi kursoj sekvis krome minikurson pri literaturo (István Ertl) kaj pri movadhistorio (Aleksander Korĵenkov) kaj povis aŭskulti donace la aliajn proponitajn kursojn de la Interlingvistikaj Studoj.

## Språkfestival i Vasa, Finland

Hur uttalar ett det bakvända R:et i ryskan? Finns det ett luxemburgiskt språk? Hur säger man "Jag älskar dig" på raumodialekt? Finns det likheter mellan finska och esperanto? Vad översätter man till vad i EU? Sker det missförstånd mellan tysktalande från Tyskland och Schweiz? Hur produceras flerspråkiga hemsidor i praktiken?

Så presenterades språkfestivalen i Vasa stadsbibliotek lördagen den 6 oktober. Det var frågan om 20-minuters minilektioner som vem som helst kunde hålla, inte grammatikföreläsningar. Esperantoförbundet i Finland firade 100-årsjubileum, och festivalen var en del av firandet.

Evenemanget utgjorde samtidigt förbundets höstdagar som avslutas med utfärd i den tvåspråkiga Vasaregionen på söndagen. Fredagens seminarium i Vasa universitets huvudbyggnad Tervahovi kl. 10-16 är liksom lördagens språkfestival öppen för allmänheten. Förutom esperanto och flerspråkighet ute i världen presenterades också ämnen som det finns ett stort kunnande om i Vasa stad, t.ex. flerspråkig administration och språkbud.

På lördag kväll var det konsert med JoMo, Jean-Marc Leclercq, omnämnd i Guinness rekordbok för sin flerspråkiga sångrepertoar. Han hade också gett minilektioner i occitanska på språkfestivaler i flera länder.

## LINGVO

### "Han satt och sjöng"

Hur översätter man "Han satt och sjöng" till esperanto? Många kanske spontant skulle översätta det till *Li sidis kaj kantis*. Det är i och för sig en både begriplig och korrekt mening på esperanto, men den som är erfaren esperantist känner på sig att den inte är vacker. Bättre är att skriva *Li kantis sidante*, men inte heller det känns som en riktig översättning. Själva sitandet betonar mer än i den svenska meningen. Möjligen skulle man kunna säga *Li kantis sidante* om en person som vanligtvis brukar stå och sjunga, men som för en gångs skull sitter ner. Kanske den bästa svenska översättningen till *Li kantis sidante* är: "Han satt när han sjöng."

Vad betyder då egentligen "Han satt och sjöng?" Vanligtvis är uttryck som "han satt och..." eller "hon stod och..." ett sätt att uttrycka varaktighet, att något pågår länge. Den bästa översättningen till "Han stod och sjöng" är för det mesta: *Li kantadis*.

Ändelsen *-ad-* uttrycker ju en upprepad handling på esperanto.

Vi som har svenska som modersmål använder spontant olika svenska uttryck, utan att tänka på vad de egentligen betyder. Vi tänker inte på att vi uttrycker upprepad handling genom att säga "Han satt och sjöng." Den språkkänsla vi har gör så att vi ändå aldrig skulle använda uttrycket "Han satt och sjöng" om en person som sittande sjunger fem sekunder.

Det finns alltså uttryck i vårt språk som man måste analysera för att verkligen komma på vad de betyder.

Leif Nordenstorm



# Lingva festivalo en Groenlanda domo

La Kopenhaga lingva festivalo estas festo, en kiu oni celebras la lingvan diversecon kaj donas gustumajn provojn de kelkaj el la lingvoj de la mondo. Sabate la 15-an de septembro ĝi okazis je la dua fojo, kaj oni intencas ke ĝi iĝu ĉiujara kopenhaga evento - almenaŭ ĝi laŭplane nepre okazu ankaŭ en la venonta jaro, kiun ja kaj EU kaj UN proklamis lingvorilata. Pasintjare la lingvan festivalon organizis Esperanto-klubo sola, ĉi-jare aliĝis la Gronlanda Domo.

La lingva festivalo estis organizita kunlabore inter Konversacia Esperanto-Klubo (KEK) de Kopenhago kaj la Gronlanda Domo. Homoj el ambaŭ ekkonis unu la alian okaze de la unua Kopenhaga Lingvofestivalo pasintjare, kiu okazis en la homsciencia sekcio de la Kopenhaga Universitato kaj estis organizita de KEK sola. La Gronlanda Domo estas institucio centre de Kopenhago, kiu zorgas pri la specialaj problemoj kaj eblecoj de la gronlandanoj en Kopenhago. La gronlandaj lingvo kaj kulturo multe diferencas de la dana, kaj la neceso koni fremdajn lingvojn estas granda en Gronlando, do ilia interesiĝo pri la lingvofestivalo estas tre komprenebla.

En "Ajmut", la parto de la Gronlanda Domo kiu normale funkcias kiel manĝejo, estis foiro: standoj kun libroj, periodaĵoj, sonbendoj kaj simile, kuiraj specialaĵoj el la diversaj landoj, kaj scenejo kie oni diverslingve muzi-

kis kaj kantis. Ĉe unu stando oni vendis lingvan kvizon, kiu funkciis kiel lotumado: Se oni povis elekti la ĝustajn respondojn de 12 demandoj, oni ricevis premion. Eble la demandoj tamen estis iom tro malfacilaj, ĉar ni devis malaltigi la postulon al 11 ĝustaj respondoj por sukcesi seniĝi pri la premioj...

La prelegoj okazis paralele en tri aliaj ĉambroj, kaj oni ŝanĝis ĉiun duonan horon. Tia festivalo funkcias kvazaŭ superbazaro. Oni ĉiam ajn havas elekton inter pluraj eblecoj. Se vi ne emas aŭskulti prelegon, jen estas budoj kaj muziko. Kaj inverse. En ĉi tiu festivalo oni povis laŭ tiu aŭ alia maniero - prelego, fulmkurso, literaturo, muziko, manĝaĵo - pli proksime konatiĝi kun preskaŭ dudeko da lingvoj/kulturoj: gronlanda, nederlanda, angla, franca, hispana, itala, romanĉa (en Svisio), latina, serbokroata, pola, latva, jida, esperanta, somalia, karibia kreolfranca - kaj kredeble mi kelkajn forgesis. Estis ankaŭ pli ĝeneralaj prelegoj pri lingva politiko, lingvoinstruado kaj lingvoperado.

La ideo de lingva festivalo originis en Tuluzo en suda Francio en 1987. Tie la festivalo okazis surstrate, kaj ĉiu ajn povis veni kaj laŭplaĉe oferti ion pri sia propra lingvo kaj diversajn kulturajn kontribuojn. Fariĝis el tio ĉiujara evento, kaj en la jaro 2000 JoMo atingis rekordon ĉe Guinness pri la nombro de lingvoj en kiuj unu persono povis kanti.

Depost la mezo de la 90-aj jaroj la ideo serioze disvastiĝis, kaj nun okazis lingvaj festivaloj en deko da urboj en Eŭropo. Ĉiuj lingvaj festivaloj diversloke okazigitaj laŭ ĉi tiu modelo estis aranĝitaj de aŭ kun Esperantistoj, jam ekde la unua en Tuluzo. Substrekindas ke ne temas pri Esperanto-festivaloj, sed pri ĝenerale lingvaj festivaloj.

Esperanto ne ludas en ili aparte elstaran rolon, kvankam Esperantoparolantoj aranĝas ilin. Temas pri aŭtenta klopodo por egalrajtigi la lingvojn. Tio ankaŭ evidentiĝas el la festivala retpaĝo kie oni trovas sloganojn kiel "Lingvo kiel riĉfonto - ne kiel problemo", "Lingvaj rajtoj por ĉiuj, sendepende de nombro de parolantoj", kaj "Se malaperas lingvo, malaperas kulturo".

Ĉio ĉi tre plaĉis al Ole Stig Andersen, unu el la prelegantoj de la festivalo, kaj verŝajne la sola serioza lingvoĵurnalisto de la dana gazetaro (ne ke la konkurenco estas prema internacie - serioza lingvoĵurnalisto entute estas malofta besto). Li havas ĉiusemajnan rubrikon en la prestiĝa tutlanda taggazeto "Information", kaj la vendredon antaŭ la festivalo li uzis la tutan rubrikon por ege favore kaj sobre informi pri la festivalo. Multaj liaj artikoloj pri la plej diversaj lingvoj legeblas en lia retejo.

La festivalon dokumentis cetere ankaŭ artikolo en la malgranda gazeto "Arbejderen" kaj filmis loka televido, kiu rezidas en la kulturdomo de nord-okcidenta Kopenhago, same kiel Konversacia Esperanto-Klubo.

Multaj aliaj lingvofestivaloj okazas diversloke en la mondo. Plej ofte aranĝas ilin ŝtataj aŭtoritatoj okaze de oficialaj lingvaj tagoj, lingvaj semajnoj, lingvaj monatoj kaj eĉ lingvaj jaroj. Tiuj ĉie plimultiĝas. Jen nur kelkaj ekzemploj: Ĝuste nun ni estas meze de la rusa lingvoĵaro, aŭgusto estis nacia lingva monato de Filipinoj, septembro estas la nacia lingvomonato de Malajzio, kaj antaŭ kelkaj semajnoj estis lingva semajno de la maitila lingvo en norda Barato. Kaj normale ne la lingvan diversecon celebras tiuj.

La festivalo vere celebris la lingvan diversecon de la mondo.

Jens Stengaard Larsen  
www.liberafolio.org

## Världsesperantokongressen (Universala kongreso) i Rotterdam 19-26 juli 2008

Anmälningavgifter (svenska kronor)

	-31/12 -07	-31/3 -08	efter 1/4 -08
1. Direkt medlem i UEA(ej MG)	1500	1880	2255
2. Icke direkt medlem i UEA	1880	2350	2820
3. Medföljande, handikappad eller ungdom(född mellan 78-01-01 och 87-12-31), som är medlem i UEA	750	940	1130
4. Medföljande, handikappad eller ungdom, som inte är medlem i UEA	1130	1410	1690

Handikappassistenter och ungdomar födda efter 87-12-31 betalar ingen kongressavgift.

Anmälningblankett för kongressen kan beställas hos:


Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, 242 35 Hörby, tel. 0415-50152

Avgifterna kan komma att justeras uppåt, om kronan försvagas.

## LIBROJ/BÖCKER!

### Doktor Zamenhof och det internationella språket

Utgiven av: Litera Turo i samarbete med SEF. Libroservo erbjuder SEF-medlemmar att köpa till specialpris. 100 kr för ett ex. inkl porto; 160 kr för två ex. inkl porto; 200 kr för tre ex. inkl porto. Passa på att ge bort boken som julklapp!



### Vere aŭ fantazie

Fjärde upplagan av Claude Piron's bok med berättelser från olika delar av världen, på lätt esperanto, med stegvis ökande ordförråd. Pris 180 kr

### Vivo de Zamenhof

Ny upplaga av en klassiker av Edmond Privat, skriven kort efter Zamenhofs död. Zamenhofs liv, filosofi, ideer om språk och verksamhet. Den nya 6e upplagan, utgiven 2007, innehåller kommentarer av Ulrich Lins. Pris 100 kr

### Ordeno de verda plumo

Ett lexikon över författare som skriver eller skrivit på esperanto, av Josip Pleadin, utgivet 2006. Uppgifter om författarnas liv och produktion, om 900 författare. Pris 360 kr

### Ankoraŭfoje pri la Esperanta gazetaro

Kritisk översikt över tidskrifter på esperanto, av Aleksander Korjenkov, utgiven 2007. Pris 35 kr

### Lingvo kaj interreto kaj aliaj studoj

Sexton föreläsningar från KAEST 2006, utgivna i år. Texter på esperanto om språk och internet, språkstudier, naturvetenskap, och med resuméer på flera språk. Pris 170 kr

### Vizito al la Centra Oficejo

I november 2005 gjordes en DVD-film (PAL, NTSC) under öppet-hus-dagen på UEA-s kontor i Rotterdam, 24 minuter lång. Pris 160 kr

### Brevmärken

UK Rotterdam 2008, 19-26 juli  
Skaffa brevmärken för nästa års kongress nu.  
Pris 15 kr för en karta om 12 märken

## LIBROJ

# Unu verko - du recenzoj

*Doktor Zamenhof och det internationella språket. En bok om esperanto och dess upphovsman med förord av Daniel Tarschys. Leif Nordstorm och Christer Lörnemark. Bokförlaget LiteraTuro. Göteborg, 2007. 170 pågöj.*

Kompakta libro kiu tamen sukcesas klarigi ĉion pri Esperanto, kaj pri Zamenhof kaj pri la ecoj kaj la uzado de la lingvo kaj pri la movado, ideologio ktp. Ĝi povus esti perfekta donaco al persono kiun lingvoj interesas por konvinki lin/ŝin lerni Esperanton. Ankaŭ por sperta esperantisto ĝi estas interesa legado se oni antaŭe ne sciis tiom pri la historio kaj aliaj aspektoj ol la lingvo. Eĉ enestas baza gramatika priskribo, tiel ke leginto de la libro prenis la unuan paŝon en la lernado, kaj trovas poste bonajn sugestojn kaj konsilojn por daŭri.

Por tiu kiu volas lerni iomete pri ĉio ĝi estas rekomendinda libro. Kaj esperantistoj, kaj neesperantistoj, kiuj volas profundigi sin havas bonajn sugestojn en la libro. Facila kaj klara libro taŭga por kiu ajn legi, kiu de mi ricevas nur laŭdojn.

Johan Krig Ölund

Antaŭ UK en Gotenburgo Eldona Societo Esperanto eldonis la libron Dr Esperanto och det internationella språket de Leif Nordstorm. Tio estis inercirompo, ĉar tiu preskaŭ centjara eldonejo neniam antaŭe eldonis iun eĉ iom ampleksan libron pri Eo. Pro tempomanko tiu eldono estis iom provizora. Nun la libro venis reviziita kaj en pli bona bindo zorge de la privata eldonejo LiteraTuro.

La valora nuna interveno de Lörnemark aldonas al la libro du aferojn, lingvosciencan dimension kaj provon klarigi la diferencon inter finvenkismo kaj raŭmismo. La libro plu estas klare finvenkisma verko kaj kiel tia ĝi estas bona, eĉ tre bona, tiom bona ke la sola diskutindaĵo estas ĝuste ĝia finvenkismeco, kiu estas des pli grava.

Tiu karaktero de la libro plej okulfrappe evidentiĝas per la granda atento, kiun ĝi donas al la angla lingvo kaj al la monda lingvoproblemo. La angla lingvo prezentiga kiel konkuranto

al Eo, malgraŭ ke konkurado kun la angla estas tiel fremda al multaj en la nuna Eo-komunumo kiel siatempe konkurado kun la franca estis fremda al Zamenhof.

La vere kriza komunikada problemo en la mondo apenaŭ estas pure lingva – ĝi estas la identec-abismo inter kulturoj, etnoj, ideologioj kaj religioj. Tia problemkonscio, pri kiu Zamenhof estis intense konscia, ankoraŭ ne trasaturis la Esperantan kulturon, sed estas des pli atentata ekster Esperantio. Tamen, venas novaj signaloj de la nova UEA-prezidanto Probal Dasgupta, kiu eksplicite diras, ke li volas religi la Esperanto-agon al la ideoj de Hector Hodler. Ni vidos, ĉu li sukcesos kaj kien tio kondukos.

Limigita priskribo de la fenomeno Esperanto riskas maltrafi aŭ forpuŝi parton de la publiko, kiu ne pretas akcepti informojn tro partiece aŭ propagandece prezentitajn pri problemoj, kiun ili malsame konceptas. Tiu parto de la publiko estas en la nuna situacio grava, almenaŭ en Svedio, ĉar ĝuste en ĝi troviĝas personoj, kiuj pli malpli formas la ĝeneralan publikan opinion pri Eo.

Aliflanke, tro detala teoria priskribo de la lingvo Eo riskas trosatigi la scivolemon – la leganto ricevas la impreson, ke li jam scias ĉion necesan por taksu – kaj, bedaŭrinde, eble forlasis la libron havante eraran impreson pri la viveco kaj de la lingvo kaj de la lingva komunumo.

Restas la espero, ke la sveda movado havos forton eldoni pliajn verkojn, kiuj per sia kuna efiko povos prezenti Eon nuance kaj plurfacete.

La enhavo distribuiĝas proksimume jene laŭ paĝoj:

13 – 22 La monda lingvoproblemo kaj ĝia ne-solvo per la angla.

23 – 28 Ĝia ebla solvo per planlingvo.

29 – 72 Zamenhof kaj Eo ĝis lia morto.

73 – 82 Rapida historia salto ĝis la naŭdekaj jaroj.

83 – 88 La hodiaŭa Movado.

89 – 165 Reklamo pri Eo kaj ĝia Movado, literaturo ktp. kaj refutado de supozataj objektoj.

Bertil Nilsson